

la reago estas specifa je la substanco ;

tiu substanco povas esti aŭ viva aŭ neviva.

Do, alergiaj fenomenoj estas tute aliaj ol venenaj fenomenoj. Plej ofte alergigaj substancoj estas senvenenaj substancoj. Alergio estas fenomeno specifa kaj individua, propra al iu persono. Se iaj urtikarioj estas kaŭzataj de ovoĵoj aŭ fiŝaĵoj, se iaj nazkataroj estas kaŭzataj de plantaj polvoj, se iaj ekzemoj estas kaŭzataj de cemento, tinkturoj aŭ kosmetikoj, la pli multo el la homoj povas manĝi ovojn aŭ fiŝaĵon, spiri polenon aŭ tuŝi cementon, tinkturon aŭ harŝmiraĵon tute sendomaĝe. Do ne tiuj substancoj mem estas malutilaj. Personoj, la alergiuloj, posedas nenormalan sentokapablon. Por tion klarigi, oni opinias, ke okazas konflikto, batalo, inter antígeno kaj antikorpo. Vi scias, ke oni nomas « antígeno » substanceton kiu estigas antikorpojn, ekz. bakterioj, organaj ĉeloj, albuminoj. Antikorpo estas specifa aĵo formata en la organismo kontraŭ antígeno.

La antikorpoj estas specifaj je la korespondantaj antigenoj. Ili estas (eble... estas nur hipotezo) specialaj globulinoj formitaj de limfocitoj (kiuj estas la ĉefaj leŭkocitoj en la sango kaj limfo) kaj plasmoceloj. La unuiĝo de antígeno kun antikorpo kaŭzus liberigon de histamino, kiu respondecas pri klinikaj simptomoj. Kiam antikorpo estas fiksita nur sur histo (tekstaĵo) aŭ organo, temas pri tekstaĵa aŭ hista alergia. Kiam antikorpoj rondiras en la sango temas pri humora alergia.

Alergia tereno do povas esti difinita dumaniere :

kapablo fabriki antikorpojn :
nekapablo neŭtrigi histaminon.

Ŝajnas tamen, ke histamino ne sufiĉas por klarigi ĉiujn alergiajn fenomenojn. Aliaj substancoj povas ankaŭ interhelpi : heparino, acetilkolino, k.a.

Flanke de tiu terena aŭ humora alergia estas alia formo en kiu oni ne povas trovi la antikorpojn en la sango. Oni supozas ilin fiksita sur histoj : temas pri hista alergia. Kelkfoje, ekzemple, la antikorpoj estas en la haŭto, kaj oni povas videbligi ilin per kutireakcio, kiu konsistas el ekzemeto ruĝa kaj veziketforma post 24 aŭ 48 horoj.

Do, resume, oni povas diri, ke la konsekvencoj de la konflikto antígeno-antikorpo estas tujaj en alergia humora kaj malfrua en alergia hista.

Kiamaniere okazas tiu kolizio ? La ĉefaj simptomoj estas : generala erupcio (eritemio) kun ĵukado (prurito). Ni nun povas vidi la manierojn por evidentigi alergiajn. Oni komencas uzi haŭtajn testojn : polverojn, plumerojn, kiam temas pri spira alergia, ovoblankaĵo, lakto, fiŝo kiam temas pri digesta alergia. Oni uzas aŭ skarifikojn, aŭ stampojn similajn al tiuj uzitaj por tuberkuloz-diagnozo.

Estas certe, ke alergiaj malsanoj estas tre oftaj. Tamen oni ne devas uzi la vorton « Alergio » ĉiukaze, kiam oni ne klare ekkonas la kaŭzon de malsamo. Ni esperas, ke la autaj linioj permesos al vi pli precizan ideon pri tiu grava afero : Alergio.

P. CHEVALIER.



**NE FORGESU
KE VI NUN DEVAS PAGI VIAN ABONON AL :**

P. Babin

13, boul. de la Chauvinière

44 - Nantes

Poŝtkonto : Nantes : 2.813.61